KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Ja haveu adquirit segells de propaganda del nostre Congrés?

MARTO-APRILO 1936 N-ROJ 226-227

20 - 50 %

malaltigis la prezojn de siaj eldonaĵoj ekde l'januaro ĉijara.

LITERATURA MONDO

pro nova valutopolitiko de la Hungara Nacia Banko kaj per tio ankaŭ la prezoj de ĝiaj neserie aĉetataj libroj apartenas al la plej malaltaj en nia literaturo. Jen kelkaj ekzemploj:

Julio Baghy: Viktimoj svfr. 2,50; anstataŭ svfr. 5.

Enciklopedio de Esperanto I-II broŝurita, ilustrita svfr. 18; anstataŭ svfr. 30.

Plena Gramatiko de Esperanto, svfr. 6; anstataŭ 8.

Tiuj nunaj prezoj senvalidigas ĝenerale ĉiujn favorajn prezojn, konstatitajn ĝis nun por kurzsuferantaj landoj. Tamen, se tiuj antaŭaj prezoj estis ie pli malaltaj, ili ne estas plialtigataj.

Por ne kauzi ĉagrenon, ni repagas al ĉiu mendinto, kiu faris sian mendon el niaj libroj post 1.januaro la diferencon inter la malnova kaj nova prezoj. Bonvolu skribi pri tio al via mendloko.

Detalan liston pri la malaltigo sendas al vi volonte la eldonejo Literatura Mondo, Hungarujo, Budapest IX. Mester-u. 53., kaj ĉiuj libristoj.

PERFUMERIA ORIENT

DE J CASANOVES

PROVENÇA, 190

(ENTRE MUNTANER I CASANOVA)

La més assortida en Cremes, Sabons, Colònies, Locions, Esmalts, Pólvores, Brillantina, etc.

Colònia des de 2'50 ptes. litre

Articles per a senyor
Objectes per a regal
Jocs de tocador
Servei de manicura

Als esperantistes 10 % de rebaixa

MARTO-APRILO 1936 N-ROJ 226-227

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:
Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj
Provekzemplero: 1 resp.

ADRESO:
València, 245 - BARCELONA

OFICIALA ANGULO

Bonvolu ne forgesi

La organizantoj de la XI Hispana Esperanto-Kongreso en Barcelona dissendis cirkuleron kun la celo «eviti erarkomprenon» sed kun la kaŝita intenco komprenigi ĝuste tion, kio ne estas vero. Bonvolu ne forgesi, sinjoroj de Zamenhof-Instituto, ke kiam vi elektis la daton de via Kongreso, vi sciis tre bone, ke la XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso okazos dum Pentekosto. Vi sciis tion tre bone tial ke unu el la partoprenantoj de via kunsido de la 6-a de oktobro, dum kiu oni priparolis kaj decidis la daton, informis vin, ke la Kataluna Kongreso okazos dum Pentekosto en Manresa kaj malgraŭ tio vi elektis la saman daton. Oni ne rajtas trompi la esperantistan publikon ŝajnigante sin viktimo de kritikoj kaj atakoj.

Ne nur pri datoj temas

La malagrabla problemo kreita de Zamenhof-Instituto kune kun Hispana Esperanto-Asocio ne povas havi plenan solvon per simpla ŝanĝo de datoj sed nur per ŝanĝo de loko. Ŝajnas, ke oni ne scias, ke en Katalunujo ekzistas landa societo fondita en 1910 kaj ke ĝi havas plenan rajton organizi kaj gvidi la neŭtralan esperanto-movadon en sia lando. Kun bedaŭro ni

devas konstati, ke en la tuta Respubliko ekzistas neniu alia asocio kun la historio de K. E. F. Tamen la organizantoj de la Hispana Kongreso opiniis, ke oni povas invadi la katalunan esperantistan kampon tute senceremonie kaj tial ili anoncis kongreson en Barcelona sen eĉ plej malgranda konsiliĝo kun K. E. F. Ili diris al si tute simple: ni estas la mastroj de la tuta movado en la Respubliko kaj ni faras, kion ni volas. Tre demokrata kaj samideaneca sinteno! Ne, amikoj, ne. Oni ne rajtas organizi Esperanto-Kongreson en Katalunujo sen aprobo kaj konsento de K. E. F.. Se en nia lando ekzistas certaj esperantistoj, kiuj neŭtrale batalas kontraŭ K. E. F., oni ne rajtas fari ilian ludon.

Ĉu H. E. A. ne havas aliajn lokojn ekster Katalunujo, kiuj ja bezonas, multe pli ol Barcelona, la propagandon de Esperanto? Kial ĝuste la kataluna ĉefurbo, kie nia movado, ĉu neŭtrala, ĉu klasa, havas kontentigan disvolviĝadon?

Palma, Sóller, Vinaroç

Oni volis pravigi la elekton de Barcelona per la senbaza argumento, ke K. E. F. havis kongresojn en la nomitaj lokoj, sidantaj ekster la limoj de Katalunujo, sed oni forgesis, ke la du unuaj apartenas al la Balearaj Insuloj kaj la tria al València, kiuj lingve kaj historie estas katalunaj regionoj.

Tiuj kongresoj naskis absolute neniun proteston de la lokaj esperantistoj kaj organizoj, la solaj kiuj havis la rajton protesti, kaj ili estis partoprenataj de ĉiuj senescepte.

Krom tio, la kongreso de Palma de Mallorca, en 1925, ne povis malhelpi tiun de H. E. A. en Córdoba, tiu de Sóller, en 1927, estis la sola kongreso okazinta dum tiu jaro kaj tiu de Vinaroç, en 1928, neniel povis malhelpi la kongreson de Sevilla.

Sed permesu al ni rememori, ke dum tiuj jaroj regis en Hispanujo la militista diktaturo de la ridinda Primo de Rivera, kiu naskiĝis kun la celo detrui la katalunan spiriton kaj dank'al tiu situacio H. E. A. kaj ĝia kunlaboranto Z. I. havis okazon ĵeti bastonojn en la radojn de K. E. F.

Tute sincere kaj lojale

La aluditaj kongresoj estis malsincere kaj mallojale bojkotitaj de H. E. A. Precipe tiu de Palma de Mallorca travivis danĝerajn momentojn. Denuncoj kaj tendencaj artikoloj en la ĵurnaloj de Palma endanĝerigis la organizon de la kongreso, la lokaj aŭtoritatuloj, servantoj de la diktatoro, ricevadis sin-

cerajn kaj lojalajn informojn pri la celo de la kongreso kaj nur dank'al la energio kaj entuziasmo de nia pioniro inĝeniero Narciso Bofill la esp. Festo povis okazi.

Sincere kaj lojale la reprezentanto de H. E. A. en plunaj Universalaj Kongresoj sukcesis malpermesi la saluton de nia reprezentanto ĉe la Malferma Kunsido. Ankoraŭ post la Kongreso de Kolonjo, kie parolis nia prezidanto, s-ro S. Alberic Jofrè, kiu samtempe reprezentis la katalunan registaron, la kutima reprezentanto de H. E. A. ĉe la U. K. sincere kaj lojale bedaŭris, ke li ne ĉeestis tiun kongreson kaj ne povis ĝui la sinceran kaj lojalan kontraŭstaron al la terura krimo de nia reprezentanto, saluti la Kongreson en la nomo de la katalunlingvaj esperantistoj.

La sincereco kaj lojaleco havas tiom da aspektoj, ke ni ne povas fari komentarion pri ĉiuj. Tiuj ecoj de H. E. A. kaj de ĝiaj neŭtralaj katalunaj kunlaborantoj speciale montriĝis per denuncoj al la polico. Per tiu sincera kaj lojala agado oni atingis stultan dekreton de la barcelona provincestro, kiu tekstis «oni forigos la vorton kataluna el la nomo de la Federacio kaj tiu ĉi devige aliĝos al la Hispana Asocio». Post tio la neŭtralaj katalunaj esperantistoj povis estri la Federacion ĝis la unua ĝenerala kunsido post la diktaturo. Tiam la membroj de K. E. F. donis la pli multe da postenoj al la tradiciaj gvidantoj de K. E. F., kaj, kompreneble, la neŭtraluloj vidis, ke ilia neŭtraleco glitis el iliaj manoj kaj eksiĝis. El tio oni komprenas kial Zamenhof-Instituto havas aŭtokratan statuton, laŭ kiu la gvidado de la societo apartenas ĉiam al la fondintoj de la societo. Tiamaniere la neŭtraleco estas plene garantiita kaj oni ne povas timi, ke iam oni fortiros ilin de la seĝoj.

Pardonu al ni la ataketon, gesinjoroj de Z. I. Vi povas vidi, ke ni nenion diras pri la neŭtrala saluto (flekso de la dekstra brako sur la bruston), per kiu honoris nin unu el viaj fervoraj membroj aŭ membridoj.

Konkludo

Ni bedaŭras, ke ni estis devigataj fari iom da historio. Neniu povos diri, ke tio estas belaj rakontoj el trans la montoj. Ni povus voki kiel atestantojn niajn amikojn en Zaragoza, kiuj en la lasta tempo ankaŭ povis sperti lojalajn kaj sincerajn denuncojn. En nia kataluna movado estas multaj novaj batalantoj, kiuj ne juĝus bone la aferon, se ili ne havus

tiujn kelkajn informetojn, kiuj ĵetas plenan lumon sur la aferon, kaj sur nian sintenadon rilate la kongreson de H. E. A.

Oni facile povas eltiri la konkludon, ke ni neniel helpos nek subtenos tian patologian kongreson, kiun eĉ la regionaj delegitoj de H. E. A. rifuzas. Ni defendos nin de ĝi kiel de naŭza najbaro, kiu eniris nian hejmon.

Por tio ni havas la sankcion de la sekvantaj grupoj aliĝintaj al la konkludoj de la kunsidoj de la 8-a de decembro kaj 15-a de marto: Nova Sento, Barcelona; Bela Espero, Manresa; Esperanta Violeto, Barcelona; Kataluna Ligo de Esperantistaj Fervojistoj; Paco kaj Amo, Barcelona; Esperanto-Grupo, Vic; Lumon, Terrassa; Aplec, Sabadell; Ĝirona Espero, Girona; Flugiloj, Caçà de la Selva; Frateco, Vendrell; Barcelona Stelo, Barcelona; Esperanto-Grupo, Ripoll; Enciklopedia Akademio Espero, Barcelona, ĉiuj delegitoj de K. E. F. kaj ĉiuj katalunaj esperantistaj pioniroj.

Sukceso atendas nin

Nova adreso. — La anonco de la Kongreso vekis en la urbo grandan entuziasmon kaj la vicoj de la grupo Bela Espero fariĝis pli multenombraj. Tial ĝi elektis novan sidejon por pli bone disvolvi la tutan prikongresan agadon. Oni atentu pri la nova adreso de la O. K.: Passeig Pere III, n.º 22, 1er.

Gravaj aliĝoj — La O. K. ricevis la aliĝon al la Kongreso de la Urbestraroj de la sekvantaj lokoj: Banyoles, Sta. Coloma de Queralt, Sabadell, Caçà de la Selva, Girona, Granollers, Vilafranca del Penedès, Reus, Vic, Ripoll, Roses Lleida kaj Barcelona.

Estas bedaŭrinde, ke pro la speciala politika situacio de multaj urbestraroj en la dato de la dissendo de invitoj, oni ne ricevis pli multajn aliĝojn kaj premiojn por la Floraj Ludoj. Tamen estas kontentige, ke por la unua fojo tiom multaj oficialaj institucioj subtenas nian Kongreson.

Kongresmarkoj. — Pro diversaj kaŭzoj la unua eldono de propagandomarkoj ne povis esti akceptata kaj ni estis devigataj fari novan eldonon. Tiu ĉi eldono estas dissendita al la grupoj. La prezo anoncita ŝanĝiĝis kaj ĝi estis fiksita po o'50 ptoj. por ĉiu folio kun 25 markoj. Turnu vin por mendoj al la Grupoj, al la O. K. aŭ la sekretario de K. E. F. Mendu tuj!

Esperanto kaj Radio. — La O. K. regule propagandas antaŭ la mikrofono de Radio Manresa. La 18-an de marto, s-ro Antoni Muset, prezidanto de la O. K. faris allogan prelegon kun la celo altiri la atenton kaj subtenon de ĉiuj manresanoj al la proksima Kongreso. Nia delegito en Sabadell, s-ro J. Pinell Mas, ankaŭ sukcesis propagandi per la tiea radiostacio. La Komitato de K. E. F, atingis permeson de la du plej gravaj katalunaj radio-stacioj Ràdio Barcelona kaj Ràdio Associació de Catalunya, fari diversajn prelegojn por diskonigi la XVIII Katalunan Esperanto-Kongreson.

Informoj — Nia proksima numero enhavos la definitivan kongresan programon, prezojn de hoteloj, de vojaĝo, ekskurso, k. t. p.

Propagandkartoj. — Por via korespondado uzu ĉiam la karton, kiun. Iberia Esperanto-Servo eldonis por la propagando de nia Kongreso. La prezo de ĉiu karto estas o'05 ptoj. Mendu al la eldoninto, str. Provença, 75, Barcelona.

XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Eksterordinaraj premioj.

XXIII. — Premio de la Urbestraro de Banyoles, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXIV. — Premio de la Urbestraro de Sta. Coloma de Queralt, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXV. — Premio de la Urbestraro de Girona, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXVI. — Premio de la Urbestraro de Reus, 25 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXVII. — Premio de la Urbestraro de Vic, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXVIII. — Premio de la Urbestraro de Ripoll, 25 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXIX. — Premio de la Urbestraro de Lleida, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

XXX. — Premio de la Urbestraro de Barcelona, 50 ptoj. Temo: «Laŭvola».

Listo de verkoj rivevitaj. — Verko n.º 15, «Reader of Reade». 16, «Renkontiĝo». 17, «Arto, Scienco kaj Libero». 18, «Mi mem». 19, «Paradizo». 20, «Kantareto por Esperanto-instruo al infanoj». 21, «G. Homo 28255». 22, «Tial: hura!». 23, «Memore de mia patrino». 24, «Batalo kaj amo». 25, «Dunedin». 26, «Amanto». 27, «Venkita». 28, «Revanto». 29, «Sopiranto». 30, «Roslino». 31, «Antikvaĵo». 32, «Vienano». 33, «Vivo estu flora ludo». 34, «Pro flandria servanda». 35, «Lernu obei!». 36, «Sopiranto». 37, «Mili». 38, «Ilekso». 39, «Rozo skarlata». 40, «Humaneco». 41, «Verda alaŭdo?». 42, «Sopiro». 43, «Fabelmondo pasinta».

Daŭriga listo venos en proksima numero kune kun la Verdikto.

EDUARD CAPDEVILA, sekretario.

PRI LA LERNOLIBRO «CURS COMPLET D'ESPERANTO»

Dum multaj jaroj la kataluna esperantistaro plendis, ke oni ne havas katalunlingve taŭgan lernolibron de Esperanto, ĉar la «Curs Pràctic», de Frederic Pujulà, cetere bonega lernolibro, estis eldonata la jaron 1913 kaj ne tute akordiĝas kun la moderna ortografio kataluna.

Plenumante promeson faritan en nia Vendrell'a Kongreso, mi verkis, rapide sed zorge, la de longe deziratan lernolibron, kaj ĝi estis reviziata de amikoj S. Alberic Jofrè kaj Delfí Dalmau kaj eldonata de nia kara K. E. F.

Nu, tiu verko—eldonita en 3,000 ekzempleroj—ne renkontis ĝis nun la dezirindan akcepton, laŭ informo de la Eldona Fako de K. E. F. pri la atingita vendocifero. Mi estas plene konvinkita, ke pri tiu fakto kulpas nur la ĝeneralaj malzorgo, malmemoremo kaj neaĉetemo pri libroj, kiujn ni povas konstati ĉe la esperantista amaso.

Tamen, por se iu pensos ke la malsukceson de la libro oni ŝuldas ankaŭ al iuj eraroj en ĝia aranĝo, mi volas publike diri

ion, kio eble estos malmodesta, sed sincera kaj lojala. Kaj miaj vortoj estos ne por mia bono, sed finfine por la bono de... la eldonisto. Ĉar mi ne dubas ke tiu ĉi artikolo instigos la katalunajn samideanojn—kiuj fine neniam restis surdaj al insista peto—aĉeti amase la restantajn ekzemplerojn de «Curs Complet».

Mi imagis tri partojn en la libro: gramatikon, ekzercaron kaj vortarojn esperantan-katalunan kaj katalunan-esperantan. Sed la financa flanko malhelpis — kiel ĉiam — niajn esperojn.

Amiko Alberic, prezidanto de K. E. F., insistis pri tio, ke oni povas aperigi nur la esperantan-katalunan vortaron. Mi rezignis je la vortaro kataluna-esperanta, sed pensis ke la vortaro esperanta-kataluna povos almenaŭ esti io kompleta. Kaj jen: mi pretigis esperantan katalunan vortaron konsistantan el 4,976 vortoj, sed la ekonomia flanko postulis kribron de 1,399 vortoj, kaj restis en la vortaro nur 3,577 vortoj. Oni forprenis, do, pli ol 28 % da vortoj. Sed, flankenlasante mian «aŭtoran amon», mi konfesu ke 3,577 estas tamen bela cifero, kaj mia vortaro restas unu el la plej kompletaj, kiujn oni povas trovi en lernolibro.

Mi opinias, ke tiu vortaro estas unu el la plej bonaj inter la nacilingvaj Esperanto-vortaroj, ne pro tio, ke mi verkis ĝin kun granda amo kaj atento, ne tial, ke mi povis profiti el la sperto pri multnombraj kaj longegaj tradukoj el lingvoj kataluna kaj hispana, sed tial, ĉar mi oftege konsultis la esperantan-katalunan vortaron de Frederic Pujulà, hodiaŭ ne tute bonan, kaj ofte memoris bonegajn difinojn, kiujn antaŭ jaroj mi lernis parkere legante iun esperantan-katalunan vortaron pretigitan de amiko Marian Solà por iu eldono, kiu ĝis nun ne realiĝis.

En tiu vortaro troviĝas plenaj vortoj: fart-i, farun-o, fasad-o, kaj ne nur radikoj: fart', farun', fasad', kio al mi ŝajnas esti pli oportuna. La katalunlingvaj difinoj estas simplaj, sed trafaj kaj signifoplenaj: en okazoj de dubo por kataluno oni precizigas; adult-i, cometre adulteri (no «ésser adult»). La kataluna traduko de ĉiu vorto estas konforma al la granda kataluna vortaro enciklopedia de Pompeu Fabra.

Pri la ekzercoj mi diros, ke, se ili ne estas abundaj, tamen ili estas sufiĉaj: okazis nur tio, ke, pro perdo de manuskriptoj aŭ pro miskompreno, ne estis presataj la ekzercoj koncernantaj la gramatikajn punktojn 59 ĝis 72, kaj sekve aperis nur la ekzercoj rilataj al la punktoj 1 ĝis 58 kaj 73 ĝis 92. Tio ne estas afero speciale grava, ĉar la 14 punktoj kiuj

ne havas post si longan ekzercon, tamen havas en si mem tute kompletan difinon kaj la plej necesan tradukon kaj komparon.

Por pruvi, ke en «Curs Complet» ne mankas ekzercoj, sufiĉas diri, ke la libro konsistas el 17 paĝoj por la antaŭparolo kaj bibliografio, 100 paĝoj por la gramatiko kaj 58 paĝoj por la vortaro. «Kaj el tiuj 100 porgramatikaj paĝoj, proksimu»me 16 paĝoj, tute precize 561 linioj, presitaj per pli mal»grandaj literoj ol la aliaj linioj, estas okupataj de la ek»zercoj».

Koncerne la gramatikon, mi volis, ke ĝi estu kompleta, kaj mi starigis 92 punktojn aŭ «lecionetojn», en 16 ĉapitroj.

Mi volis iri mezan vojon: la bonega Esperanto-gramatiko de P. Christaller, samtempe en germana kaj en esperanta lingvoj, enhavas 176 «punktojn», kaj la 16 reguloj de la «Fundamento» disvolviĝas fakte en 47 «punktojn». (Ekzemple: la regulo 7.ª havas unu punkton: e estas adverba finiĝo; sed la regulo 6.ª dividiĝas en 14 punktojn: as, is, os, us, u, i, ant, int, ont, at, it, ot, helpa verbo esti, kaj uzo de prepozicio «de» post pasivo).

Mia «gramatiko» ne pretendas esti speciala didaktika metodo, sed nur repertorio de ĉio, kio troviĝas en Esperanto, aranĝita laŭ gramatika sistemo, tute konforme al la tradicio, kaj sen trokuraĝaj, malmodestaj novaĵoj. Mi pritraktis la vortkunmetadon koncize, sed tute laŭscience. Eble rimarkinda aspekto de mia verko estas tio, ke mi klarigis prefiksojn kaj sufiksojn tute detale, longe, pli atente ol oni kutimas, kun abundaj ekzemploj, montrante la plej kutimajn uzmanierojn, proponante al la lernanto la plej klasikajn vortojn, kie afiksoj troviĝas, plej diversmaniere uzataj. Kaj la 23 paĝoj de mia verko, dediĉitaj al prefiksoj kaj sufiksoj, egalvaloras ankoraŭ kiel ekzerco-paĝoj.

La kataluna gramatika lingvaĵo estas simpla kaj pura; la gramatikaj difinoj saĝaj kaj ĝustaj; mi ne volis montri min originala kaj brila.

* * *

En la lasta tempo mi praktike konstatis, ke la «Curs Complet d'Esperanto» plene taŭgas por kursoj en societoj, por kursoj per korespondado, kaj eĉ por memlernantoj.

Mi uzis ĝin dum trimonata kurso (novembro 1935-januaro 1936), kiun mi klarigis ĉe «AGEA» en Barcelono («Associació General d'Empleats d'Assegurances»); en alia kurso

ĉe rondo de poŝtistoj; en rendevuoj kun maljuna verkisto kataluna; kaj en kurso de Esperanto per korespondado. Tio permesis al mi konstati, ke la eraroj, eĉ se korektindaj, estas malmultaj, kaj plejofte temas nur pri preseraroj, ĉar la libro estis presata dum mi forestis el Barcelono.

Amiko informis min pri riproĉoj, de li aŭditaj, ke «Curs Complet» estas tro «gramatika», ke ĝi estas tro por «superaj» lernantoj, ke ĝia kataluna lingvo estas tro «korekta» kaj malfacile komprenebla por mezinstruitaj katalunoj. Nu, post trimonata kurso iuj lernantoj miaj diris, ke Esperanto instruis ilin pri tiu parto de la gramatiko vere interesa kaj necesa; iu el ili hispanlingvano, rimarkigis ke li samtempe akiris konon pri Esperanto kaj pri kataluna lingvo kaj asertis ke li ŝatas mian katalunlingvan verkon eĉ pli ol alian Esperanto-gramatikon hispanan, kiun li trovas «liosa»; la plejmulto el miaj lernantoj per korespondado persistis ĝis la fino kaj bone komprenis ĉiujn lecionojn kaj faris ĉiujn ekzercojn.

Mi volonte klarigos al ĉiuj katalunaj esperantistoj kiamaniere oni povas sukcese uzi la lernolibron «Curs Complet», se ili tion ne divenis post atenta tralego de miaj 92 punktoj; kaj se ili petas tion de la direktoro de KATALUNA ESPERANTISTO, mi eĉ estos preta verki specialan artikolon pri la temo; sed hodiaŭ mi volis nur rebati kelkajn senbazajn kritikojn.

Alia demando estas, ĉu montriĝis pli taŭga, por instrui Esperanton, metodo gramatika aŭ rekta metodo. Pri tio ĉiu havas sian opinion, sed plej saĝe estos, se ni, esperantistoj, evitos ankaŭ pri tio reciprokajn atakojn kaj polemikojn.

JAUME GRAU CASAS, L. K.

BIBLIOGRAFIO

Enciklopedio de Esperanto, du volumoj, de AELA, eldono de Literatura Mondo, Budapest, 1933. (La dua volumo aperis en januaro 1936). Formato: 23'5×15'5 cm. Entute pli ol 900 paĝoj, 300 el ili plenaj de ilustraĵoj. Redaktis: Kökény kaj Bleier, Lingva fako: Kalocsay. Iniciatinto: Ŝirjaev. Kunlaboris preskaŭ 60 esperantistoj kaj pli ol 50 verkis artikolojn aŭ donis valorajn informojn.

La esperantistoj neniam povis revi pri simila verko, la plej malfacile ellaborebla el ĉiuj libroj: Enciklopedio de Esperan-

to. Nenio preta aŭ komencita ekzistis en nia movado tiurilate. Nur kelkaj manskribitaj folioj de nia malaperinta amiko pastro Ŝirjaev, konstanta kaj abunda partopreninto de niaj Int. Floraj Ludoj. Se tiu kara s-ano, vidus nun kio kreiĝis ĉirkaŭ lia komencita manuskripto? Por doni ideon pri la amplekso kaj multflanka laboro de la redaktantoj, ni nur citu ke ili elspezis pro la afranko de leteroj kaj cirkuleroj 800 sv. frankojn. Kia peniga laboro eltiri informojn kaj kunlaboron de malproksimaj esperantistoj! Sed fine oni kunigis la necesan materialon kaj nun la ĉefredaktoroj povas vidi sian entrepenon preta, finpresita kaj en la manoj de la esp-istaro, kiu siaflanke devas esprimi al ili senfinan dankon pro la altmerita juvelo enkadrigita en nian esperanto-librotrezoron.

La verko, en sia tuta esenco, estas laŭdinda laboro por starigi definitivan historion de nia movado tra ĉiuj branĉoj de la tutmonda kulturvivo, depost la apero de la lingvo ĝis niaj nunaj tagoj. Pli ol 20 longaj artikoloj pri respektiva landa historio de la E.-movado, ampleksantaj kelkaj el ili preskaŭ 20 dukolonajn paĝojn. Longaj kaj kaj mallongaj biografioj de proksimume 2,000 E-pioniroj. Interesa resumo de la E-gazeta vivo tra ĉiuj landoj dank' al la plumo de s-ro Tarnow. Multaj gramatikaj kaj lingvistikaj studoj el la kompetentaj s-anoj. Grosjean-Maupin, Kalocsay, kaj Drezen. Legindaj citoj kaj kritikoj pri ĉiuj int. lingvoj kiuj pretendis starigi konkurencon al E. Mallongaj priskriboj de la religiaj sektoj kiuj sincere alprenis E-on., kiel ekz. Oomoto, Bahaismo, Mariavitismo, Kvakerismo, Novspirito, k. a. Detalaj kaj ofte longaj informoj pri la kontakto, kiun E. havis kun medicino, filatelio, poŝto, komerco, scienco, muziko, ŝako, kaj ankaŭ kun la katolikaj, proletaj, liberpensulaj, k. a. movadoj.

Neeble daŭrigi kun simplaj citoj por bildigi la grandiozecon de la verko, kiu okupas nian atenton. Multajn paĝojn ni bezonus por iel sukcesi. Tamen ni elstarigu el tiu multflanka kompilo de esperantistaj faktoj kelkajn pecojn, kiuj certe decidigos multajn legantojn posedi la duvoluman «Enciklopedio de Esperanto».

Vere interesaj estas la prihistoriaj artikoloj de la E-movado en Francujo, Polujo kaj Japanujo. La biografioj de Grabowski kaj Kabe ellaboritaj de Sro. Kalocsay. Evoluo de E. Ido kaj E., kaj Io-ujo-batalo, de la kompetenta s-ano. Grosjean-Maupin. Skizo pri la fundamento de E. dank' al la filino de nia Majstro Lidja Zamenhof. Internacia lingvo (Historia skizo ĝis Volapük). Skiza raporto pri ĉiuj okazintaj Univ. Kongresoj.

Esperanto-Muzeo en Wien. Int. Floraj Ludoj. Instrumetodo ĉe. Raporto pri la kreo, tasko kaj celo de la Lingva Akademio. Rigardo sur la ĝenerala stato de la E-a. Literaturo. Kaj multaj rubrikoj zorge kaj alfabete ordigitaj iras unu post la alia, plenigas paĝojn post paĝoj ĝis la fino de la tuta verko, kaj ĉe ĝia finlego vi rimarkas, ke vi akiris kaj ĝuis ion, kio ankoraŭ ne ekzistis en la movado: nian historion.

Mi nur volas riproĉi la redaktorojn de tiu ĉi verko, (ĉefe tial, ke mi estas kiu redaktis la historion de E. en Katalunujo) kial ili permesis, sen antaŭa konsulto, ke iu hispana s-ano. donu arbitran prononcadon de la katalunaj nomoj? Oni skribas, ekz., Pujolà i Vallès kaj oni donas la hispanigitan elparolon: Puĥolan i Vallez. Kaj kun simila procedo, tio daŭras kun la ceteraj nomoj de niaj katalunaj pioniroj. Sed pro tio nenion suferas nia kataluna lingvo, sed ja la verko mem, kiu, espereble, en dua eldono ne suferos tiun nelogikan lamecon. — EDCA.

Ilustrita Lernolibro de Esperanto por Praktika komenca kurso, de Delfí Dalmau. Format: 17×24.

En encomanar-se'ns que féssim un comentari d'aquest bell «Manual Il·lustrat d'Esperanto per a un Curs Inicial Pràctic» va semblar-nos l'encàrrec massa pesant per a la nostra contextura intel·lectual, donada la magnitud de la personalitat del seu autor.

Nosaltres, recentment reintegrats al moviment esperantista, jutges d'una obra didàctica d'una autoritat pedagògica indiscutible, un prestigi universalment reconegut en el camp de la filologia, especialitzat en la llengua catalana i l'idioma Esperanto! Uns pigmeus jutjant un colós!

Ah!, però, aquesta és la nostra! No li'n perdonarem cap!

A la portada trobem la preposició «por» emprada en dos sentits. Per més que els esperantistes erudits, àdhuc el mateix Zamenhof, usin el mot «por» en frases com «Kun danko...; «por» patronado...», nosaltres trobem que l'agraïment sempre ve després de la mercè rebuda, és a dir, a posteriori, perquè la gràcia, el favor, l'afecte, és el qui motiva l'agraïment. Hauriem trobat més intel·ligible si digués: «pro patronado, pro tralego, pro korekto». Contràriament, les destinacions són fetes a priori; primerament hom destina la cosa, després en fa ús. Doncs està bé: «Ilustrita Lernolibro «por» Praktika, etc.»

Els professors han d'ensenyar que per a introduir les rela-

cions de «finalitat», de «destinació», l'Esperanto disposa del mot «por», i per a fer-ho de les de «càusa», té la preposició «pro».

Amb els alumnes que comencen a aprendre un llenguatge, hom no pot anar-hi amb filigranes estilístiques.

És més discutible, hagut esment de la seva construcció, el plural «piedoj» de la proposició «Ankaŭ estas la dekstra kaj la maldekstra piedoj». (Kvina leciono). Aquesta proposició prové d'una el·lipsi. La proposició plena és: «Ankaŭ estas la dekstra piedo kaj la maldekstra piedo» La supressió del primer piedo no justifica la pluralització del segon. Hauria estat millor, potser, que s'hagués construït així: «Ankaŭ estas la dekstra piedo kaj la maldekstra».

Encara és més discutible el tracte donat als verbs-participis, bo i aplicant-los les lleis de la concordança com si fossin adjectius-participis (o participis-adjectius).

En la mateixa lliçó cinquena trobem la pregunta «Ĉu vi havas amikinon loĝantan eksterlande?». La presència de l'adverbi «eksterlande» ens mostra clarament el caràcter verbal del participi «loĝanta», i, per tant, es demana una predicació, com en tots els verbs-participis (o participis-verbs). És clar que els adjectius també són modificats per adverbis, i hom podria dir que amb la pregunta «Ĉu vi havas amikinon loĝantan eksterlande» es demana una atribució. Ah!, en aquest cas, però, cal preguntar: ¿L'amiga és del país o estrangera? Si és estrangera, «ja» té la «qualitat» de viure fora del país, i la pregunta no pot fer-se sobre la «qualitat», sinó sobre l'amiga. Nosaltres hauríem dit: «Ĉu vi havas amikinon eksterlandanan (aŭ eksterlandan)?» Però, si l'amiga no és estrangera, si l'amiga és del país, la pregunta és sobre una «circumstància» de l'amiga, no sobre una «amiga» que té una determinada qualitat; el que es demanaria, no és una atribució, sinó una predicació. En aquest cas, nosaltres hauríem dit: «Ĉu amikino via loĝas eksterlande?», o, aprofitant la pregunta del text: «Ĉu vi havas amikinon loĝanta (sense la «n» de l'acusatiu) eksterlande?».

Un altre cas semblant, però invers, és el no sotmetre a les lleis de la concordança els noms propis en funció d'adjectius.

En la lliçó quarta trobem el següent exemple: «Hieraŭ mi vidis vian amikon Petro» Si el nom propi distingeix dos amics, l'un de l'altre, també els distingiria una qualitat qualsevol, com, per exemple, el color de la pell. Si dos amics, anomenats respectivament Pere i Joan, l'un és negre i l'altre és

blanc, hom hauria de dir: «Hieraŭ mi vidis mian amikon nigran (aŭ blankan) Doncs, semblantment: «Hieraŭ mi vidis mian amikon Petron (aŭ Johanon)».

Advertim al lector, però, que el Sr. Delfí Dalmau s'ha cenyit a la doctrina consagrada per la tradició i pels bons autors, encara que nosaltres no hi estiguem conformes, i, consegüentment, exposem amb lleialtat el nostre criteri.

I, ara, diguem alguns mots sobre el susdit «Manual» com a instrument didàctic.

Hem començat qualificant-lo de bell. No hem exagerat. És bell de forma i de contingut.

Les seves ben metoditzades dotze lliçons, totes a base d'imatges (làmines i dibuixos) llevat de l'última, evidencien el pedagog avesat a les modernes orientacions sobre l'ensenyament dels idiomes. Res d'enfarfegosos tecnicismes ni lleis gramaticals. Tot exercicis i conversació contínua. El fet gramatical no compta; només impera el fet de llenguatge. Primerament l'educand ha de parlar, després estudiarà la gramàtica.

Heus aquí, en síntesi, què és aquest magnífic auxiliar del professor i de l'alumne, no de l'autodidacte, que nosaltres recomanem als qui es dediquen a l'ensenyament de la llengua internacional. — SAMUEL ROCA I RODÓ.

ENLANDA MOVADO

Terrassa. — En la sidejo de Esp. Grupo Lumon okazis la ordinara ĝenerala kunsido kaj estis elektita la jena komitato: Sebastià Chaler, prezidanto; Guiordano Moya, vicprezidanto; Ramon Corominas, sekretario; Màxim Buisan, vicsekretario; Josep Ribera, kasisto; Jaume Banyeres, bibliotekisto; Ramon Marsà, kalkulisto; Antoni Vergés, Josep Hierro kaj Pere Mateu, voĉdonantoj.

Samtempe oni decidis translokigi la grupejon al str. St. Pere, 40, 2n.

Manresa. — La 9-an de februaro okazis la ĝenerala kunsido de «Bela Espero». Dum ĝi oni priktraktis diversajn aspektojn de la Kataluna Esp. Kongreso, kies organizon prenis sur sin la malnova grupo. La multnombra ĉeestantaro kun entuziasmo aprobis la laborplanon de la O. K. Oni elektis novan komi-

taton, kiu sub la prezido de s-no Antoni Muset konsistos el la sekvantaj gesamideanoj: Modest Tuset, Angel Llobet, Josep Comas, Joan Ferrer, Elisi Barandalla, Ramir Sánchez, Carme Ramos kaj Concepció Tubau.

Vic. — Kiu jam vidis la premion, kiun nia Esperanta Grupo donacas por la nunjaraj Floraj Ludoj, tiu konsentas, ke ĝi estas valora artaĵo. Ĝi konsistas el kvarangula dika arĝenta plato (58×50 milimetroj) sur kiu reliefiĝas du viraj figuroj surportantaj girlandojn de floroj. Ĉe la centro montriĝas la kvinpinta stelo, bele emajlita, kaj sub ĝi estas gravurita la jena teksto: «XVII Internaciaj Floraj Ludoj, Manresa, 1936. Premio de Esperanta Grupo de Vic». La plato estas fiksita sur nigra polurita marmortabuleto kaj la tuto enmetita en eleganta ujo interne remburita per verda veluro. Certe ĝi estas ambiciinda premio.

—Baldaŭ en nia grupo komenciĝos nova kurso kiel refreŝigo por la Vic-aj partoprenontoj de la Kongreso en Manresa.

Roses. — La loka movado, dank'al la agemo de la grupo «Brava Marbordo», estas eksterordinare vigla. En la grupejo okazas tri kursoj de Esperanto, por knaboj, por knabinoj kaj plenaĝuloj. Krom la poresperanta tasko la grupo disvolvas grandan kulturan planon, el kiu ni mencias kurson de mekanografio kaj alian de franca lingvo. Estas en preparo kurso de angla lingvo. Ĉiumarde okazas prelegoj kun multnombra ĉeestentaro. Dum marto prelegis s-no Antoni Garriga pri «Antikva Historio», s-no Antoni Portell pri «Deveno de la religioj», s-no Pere Guitart pri «La seksaj sektoj en la Rusujo de la Caroj» kaj s-no Antoni Vilà pri «Geologio kaj Biologio».

Barcelona. — Sub la organizo de K. E. F. la 13-an de februaro okazis en la sidejo de Institut Naturista Ferrandiz prelego de s-no Jaume Grau Casas pri «La lingvo internacia Esperanto». Post la prelego anonciĝis kurso de Esperanto kaj enskribiĝis multaj novaj lernantoj. La kurso okazas sub la gvido de s-no Josep Garganta.

—En la sidejo de «Paco kaj Amo» s-no S. Alberic komencis novan kurson laŭ praktika metodo. Partoprenas ĉirkaŭ 30 gelernantoj.

—La 17-an de februaro nia s-no Josep Banet komencis perfektigan kurson en la societo «Nova Sento» kun multaj partoprenantoj.

València. — La Grupo Esperantista Valencia dum la ĵus pasinta jaro tre vigle laboradis por nia idealo en diversaj kampoj, precipe ĉe Radio, Komerco, Instruado kaj Propagando. Tial oni pensis, ke dispublikigo de tiu sukcesa agado inter la neesperantistoj estus bona propagando por nia celo. Do, oni presigis milon da bonaspektaj broŝuretoj enhavantaj ne nur la jarraporton (1935) de la Grupo Valencia verkita de ĝia agema Sekretario Sro. Bosch (G.) sed ankaŭ la verkon, kiun la Vic-Prezidanto Sro. Piñó prezentis al la Ekonomia Konferenco de la Valencia-lando. Ĝia titolo estas: «La tutmonda esperantista organizo je helpo al la Valencia Ekonomio». Ambaŭ artikoloj estas hispanlingvaj kaj la broŝurojn oni dissendas al ĵurnaloj, gazetoj, instruistoj, politikuloj, kaj al Societoj instruaj, komercaj, literaturaj kaj ekonomiaj, k. t. p.

Ĉiu, kiu deziras ricevi senpage ekzempleron, petu ĝin al «Grupo Esperantista Valencia, Sangre, 9, València».

NIAJ MORTINTOJ

Robert Kreuz, la Direktoro de U. E. A., mortis la 31-an de januaro en Genève neatendite. Nia Direktoro estis tre konata kaj estimata de la katalunaj esperantistoj, kiuj havis lian kuneston dum nia Kongreso en Palma de Mallorca. Kreuz estis la plej kompetenta esperantisto en la gvidado de nia movado kaj nur dank'al lia kompetenteco la financoj de U. E. A. povis trovi ekvilibron. La morto trafis lin ĝuste en la momento kiam nia organizo plej multe bezonis lian talenton. La grava krizo de nia movado tre malfacile povos ĉesi sen lia gvido kaj konsiloj. Al lia funebranta edzino kaj familio ni esprimas nian plej koran kondolencon.

Nia samideano Adolf Figuerola ĵus forlasis nian mondon. Al lia familio nian sinceran kondolencon.

Nia kunbatalanto Vicenç Navarro Lillo, 23-jara, mortis la 13-an de marto, en Alacant, post nelonga malsano pro intesta febro. Sinceran kondolencon.

Al niaj amikoj Manuel Salom Fornals kaj Guillem Bosch, vicprezidanto kaj sekretario de Esperantista Grupo Valencia, ni esprimas nian kondolencon pro la morto de ilia patro.

LA GRANDA KRIMO

Ŝajnas ke la mondo forgesis, ke dum kvar jaroj—1914-1918—la homoj faladis en la tiel nomata kampo de l'honoro. La plej grandaj hombuĉadoj okazis dum tiu terurega mondmilito, kiu postlasis tiom da mizero, tiom da larmoj, tiom da doloroj. Vidu kiom da mortintoj, vunditoj kaj kripluloj postrestis. Kiam post la kvarjara skuego super la homoj ekregis paco kaj la kanonoj silentiĝis, ĉiu havis la konvinkon, ke neniam plu la stulteco superregos nin. La sperto estis tro multekosta. La vizio de la teruraj militscenoj, de la miloj kaj miloj da orfoj, kripluloj, vidvinoj, maljunuloj kun larmoj en la okuloj pro la perdo de iliaj filoj, elokvente parolis pri la vera signifo de milito.

MORTINTOJ

Neniu povis supozi, ke iam, en baldaŭa tempo, la homoj denove estos pretaj komenci alian pli teruran tragedion. Oni forgesis ĉion kaj novafoje ni staras apud la abismo. Simpla bloveto kaj la mondo ekbrulos, ĉio detruiĝos, ĉio pereos. Por garantii daŭran pacon, ĉiu nacio armis sin ĝis super la kapo. Kun entuziasmo oni aplaŭdas la paradojn de miloj kaj miloj da soldatoj, oni admiras la geometrie perfektan superflugon de aermaŝinoj: bela spektaklo! Ĝi antaŭdiras, kio estos la nova freneza krimo: ekstermo, neniigo absoluta de ĉio celanta alproksimigon de popoloj, disfalo de ĉiuj celadoj al pli justa harmonia socio, mizero, morto, malamo.

VUNDITOJ

KRIPLULOJ
(Desegnoj de J. Comella)

La ombro de tiuj, kiuj pereis baraktante sur la koto de la batalkampoj, stariĝas kaj malbenas la senkonscian homaron, tiun privilegiitan specon, kiu staras sub la nivelo de la plej sovaĝaj bestoj.

S. ALBERIC JOFRÈ

Impremta «La Renaixença», Xuclà, 13 - Barcelona

Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas

La millor gramàtica en català de la llengua Esperanto. Empreu-la en tots els cursets!

Preu: 3'50 pessetes

Adreceu-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"

Dank'al la klopodoj de **Kataluna Esperantista Federacio,** aperis jam tri serioj de bildkartoj kun teksto en esperanto.

Aperis jam serioj de

TARRAGONA
PALMA DE MALLORCA
BARCELONA

ELDONITAJ DE LA FAMA

ZERKOWITZ

K. E. F. povas ilin haviĝi al vi je tre favoraj prezoj.

Mendu tuj!

TESTIMONIATGES

ILUSTRITA LERNOLIBBRO DE ESPERANTO por praktika komenca kurso de Delfí Dalmau, L. K. (Barcelona). (Tute en Esperanto.)

Inter la lernolibroj, kiuj lastatempe ofte aperas en diversaj landoj, tiu-ĉi certe okupas tute apartan lokon. La tuta laboro de la lernanto baziĝas sur bildoj kun multaj desegnaĵoj, racie elektitaj kaj bone faritaj. La vortoj kaj la frazoj respondas al la praktika ĉiutaga vivo. La libreto donas en 12 lecionoj sufiĉan konon por poste memstare sekvi nian literaturon kaj gazetaron. Menciinda estas ankaŭ la alloga eksteraĵo. Oni rimarkas, ke la tuto estas farita per lerta kaj sperta mano, gvidita de amo al nia lingvo.

(De «La Semanto» de Suïssa.)

ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO por Komenca kurso — «Didakta» — de Delfí Dalmau, L. K.—Prezo 1 ekzemplero, 1 angla ŝilingo.

Trarigardante la lernolibron de la unua ĝis la lasta paĝoj, frapanta estas ĝia utiligebleco por mallongtempdaŭraj Esperantokursoj. La multnombraj demandfrazoj promesas vigligon de la praktika parto de la leciono, laŭ la deziro de la lektoro, kaj laŭ la intereso de la gekursanoj. La dekunu kliŝoj, ĉiu el ili enhavanta multe da figuroj, faciligas la uzeblecon de la lernolibro de la gekursanoj ekster la kursoj. La figuroj faciligas la memoradon de la vortoj kaj donas klarecon.

Ni rekomendas la lernolibron rimarkante, ke ĝi taŭgas por ĉiuj landoj, ĝi estas vere internacia lernolibro.

(«Internacia Veterinara Revuo» de Bulgària.)

Tots els futurs esperantistes comencen a aprendre l'Esperanto. Si el curs elemental és prou bo, pràctic i agradable, se'n poden salvar molts. Per tal de facilitar l'èxit dels cursos elementals, ha estat fet l'*Ilustrita Lernolibro Didakta* que tan ben rebut és arreu del món esperantista.

Preu: 1'50

CONDICIONS ESPECIALS PER ALS GRUPS

Demaneu-lo a l'adreça de la K. E. F. – Telèfon 78352

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL